

# KOSMOS


ESPERANTO • LA KOSMOLOGIO DE MARTINUS • 2-2008

La galaksioj de la universo

Tien

Intervjuo – Claude Piron


Fabeloj kaj kosmologio



# Piron rivelas siajn pensojn pri "di"

Dio, psiĉjo kaj mi

"Dio, psiĉjo kaj mi" estas, en esperanto, nova kaj bedaŭrinde la lasta libro de Piron. La verko aperis jam antaŭ kelkaj jaroj en la franca sed nur ĉi-jare estis eldonita ankaŭ en "la bona lingvo". La tuta libro estas dialogo inter psikologo kaj viro kiu nokte travivas ion tre eksterordinaran. La viro antaŭe estis paciento de la psikologo pro malagrablaj spertoj kiel kaptito en fremda lando. Tamen nun ne temas pri tio ke "psiĉjo", kiel la ekspaciento nomas sian psikologon, helpu malbonfartulon sed pri ia esplorprojekto. Nome la psikologon interesas la bonega resaniĝo de la viro kaj kiel liaj noktaj travivaĵoj povas efiki tiel sanige kaj harmoniige al antaŭe tre vundita animo. Ili regule renkontiĝas kaj diskutas pri tiuj travivaĵoj kiuj preskaŭ ĉiam iel rilatas al "di". Piron fakte enkondukas novan pronomon, "di", kiu laŭ li donas pli proksiman kaj intiman rilaton, anstataŭ uzi "Li" aŭ "Dio" aŭ simile. (Tio estas por mi plaĉa propono kiun espereble multaj akceptos.) Ĝenerale la lingvaĵo, kiel kutime en "pironaĵoj", estas tre agrabla kaj bela. Kelkaj tajperaroj tamen restas kaj iom ĝenis min la disskribo de "ekde". En la libro do plej ofte estas tiel ke la eksklinto parolas pri siaj mirindaj travivaĵoj kaj la psikologo skeptike pridemandas kaj komentas. Oni sentas ke Piron mem laboris kiel psikologo kaj bone scias la ĵargonon. La diskutoj inter la du viroj estas pensigaj kaj donas multe da optimismo. La leganto ricevas vere luman bildon pri di kaj estas agrable vidi kiom intime kaj amikece Piron priskribas "la misteran forton". Tamen, la diskutoj ne vere donas respondojn al iuj el la tiel nomataj vivodemandoj. La libro tuŝas plurajn interesajn



demandojn sed ne multe profundiĝas en ilin, por tio verŝajne necesus multe pli ampleksa verko. Malgraŭ tio la libro estas tre interesa, aparte pro tio ke Piron en ĝi supozeble, almenaŭ parte, priskribas siajn proprajn noktajn travivaĵojn kaj sian rilaton al di! Tiun supozon mi bazas je tio ke pluraj aferoj en la libro troviĝas en la interjuartikolo "Interesaj respondoj"<sup>1</sup>. Do, "Dio, psiĉjo kaj mi" certe estas tre leginda por ĉiuj kiuj volas pli bone kompreni la internajn pensojn de unu el la plej gravaj esperantistoj niatemp.

Hokan Lundberg, Stokholmo

<sup>1</sup> <http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/respondoj.htm>



# La galaksioj de la universo

*de Martinus*

## 1. La fizika spaco

Kion ni scias pri la nemezurebla stelĉielo, kiun ni vidas volviĝi super niaj kapoj dum sennubaj noktoj? La materiisma scienco atingis la staton montri al ni, ke ĉi tiu ĉielo superas ĉion, kion oni povas prikalkuli rilate al grandeco, distanco, tempo kaj spaco. La scienco ne povas uzi ĝenerale uzatajn ĉiutagajn esprimojn kiam oni parolas pri la distancrilatoj de la ĉiela spaco. Ili estas tiom gigantaj, ke oni devis krei novan mezurunon por povi pensi en tiuj perspektivoj, mezurunuo, al kiu oni donis la nomon "lumjaro". Oni tiamaniere kapablas mezuri la distancojn al foraj suno- kaj galaksisistemoj, kiujn oni povas observi per binokloj kaj teleskopoj, kaj kiuj troviĝas centmiloble pli longe for de la tero ol tiu spaco, kiun la lumo per rapideco je po 300.000 kilometroj en sekundo travojaĝas dum unu jaro. Sed tio fakte signifas, ke ju pli malproksime ni provas rigardi en la universon, des pli ni rigardas en la pasintecon. Kiam ni pere de helpo de optikaj aparatoj vidas stelbildojn aŭ galaksiojn plurajn cent mil lumjarojn en la mondspacon ni ne vidas ilin, kiel ili nuntempe aspektas, sed kiel ili aspektis antaŭ pluraj cent mil jaroj. Ke ĉi tiuj stelbildoj kaj galaksisistemoj estas furiozaj fajrooceanoj kaj ardantaj sunoj de diversaj varmgradoj ne donas iun veran solvon pri la enigmo aŭ tiu mistiko, en kiuj la ordinara homo estas envolvita. La fizika scienco faras grandan kaj netakseblan laboron pri pesi kaj mezuri kaj taksi rapidecon,

sed la misteron de la universo oni ne povas solvi nur per ĉi tiuj metodoj. Ili donas perspektivon en kiu la penso povas labori, sed la penso devas interne de ĉi tiu esplorkampo, same kiel ĉie en la vivo, trovi la vojon al la rezultoj de vivesprimoj, kaj ne nur al mezuro- kaj pezrezultoj.

## 2. Makrokosmo kaj mikrokosmo

Kion ni observas tra ĉi tiuj gigantaj stelsistemoj en la universo? – Kaj kio estas la celo pri ili? – Ĉu ĉi tiuj milionoj da steloceanoj nur ekzistas por montri al la loĝantoj de la tero lumantajn punktojn en la mallumo de la nokto, kiel oni kredis en pasinteco? – Ne, preskaŭ neniu homo kredas tion nuntempe. Oni scias, ke la tero ne estas la centro de la universo, tiel, kiel oni komprenis pere de la malnova, religia kaj dogma mondbildo. Oni scias, ke ĉi tiuj galaksioj kaj sunsistemoj havas tiom grandajn dimenciojn, kaj la tero tiom malgrandan rilate al tiu ĉi, ke estus stranga malŝparado pri fortoj de la naturo lasi ĉiujn tiujn ĉielkorpojn ekzisti nur pro la tero aŭ precipe pro la homaro. La naturo ne malŝparas fortojn, male, ĉio plenuziĝas kaj siamaniere utilas favore al la tuteco. Ĉi tie sur la tero maleblas konstati, ke io ajn malŝpariĝas en la mastrumado de la naturo. Ĉu ni ne vidas, ke la velkinta folio aŭtune absorbiĝas en la ciklon, ke la rubaĵproduktoj transformiĝas al utila sterko, kaj ke estas la sterkamaso kiu helpas aperigi la pangrenon? – Eĉ akvero estas abunde plena je vivo, kun

etaj estuloj, kiujn ni povas observi pere de mikroskopoj, kaj kies vivvolvado montriĝas esti absolute necesa en la granda vivkohero. La elvolvado de la vivforto montriĝas ĉie tute ĝis la mondo de la atomoj kaj elektronoj, kiuj ja fakte estas konsiderataj kiel speco de mikroskopaj sunsistemoj. Ĉu la mondo povas ekzisti sen la atomforto? – Ne, maleblus. Nek la homoj, la tero, la sunsistemoj nek la galaksisistemoj ekzistus, se tiuj atomsistemoj ne ekzistus, el kiuj ĉio estas konstruata. Neniu sufiĉe malgranda partiklo en mikrokosmo ekzistas sen esti utilo al la tuteco. Per kiu logika argumento ni povas supozi, ke la gigantaj partikloj en la mondspaco, kiujn ni nomas globoj, sunsistemoj kaj galaksisistemoj, ne estas submetitaj al samaj leĝoj kaj principoj evoluigitaj laŭ pli granda mezurilo? Multaj el ĉi tiuj stelbildoj kaj ĉielkorpoj ne estas globoj en la ordinara senco, sed nemezureblaj oceanoj de fajroamasoj, bolantaj metaloj reprezentantaj movon kaj fortoelvolviĝon, kiujn oni ne povas mezuri per kutimaj esprimoj de forto. Ne temas pri cent- aŭ miloj da ĉevalpovoj, sed pri milionoj, jes, miliardoj kaj denove miliardoj da ĉevalpovoj, kiuj elvolviĝas. Kredi, ke ĉiuj tiuj fortoelvolviĝoj, kiuj reciproke influas unu la alian, nur estas esprimo de hazardoj, kaj ke la gigantaj ĉielkorpoj sekvas siajn laŭleĝajn orbitojn aŭ ciklojn en la universo dum nemezureblaj tempospacoj tra grandaj distancoj nur pro nenio aŭ nur por esti observataj de nia tero, estas nur esprimo de naiveco kaj mallarĝanimeco. Nia malgranda tero estas nur kiel polvo rilate al la gigantaj ĉielkorpoj kaj galaksisistemoj, kaj ni mem estas rilate al tiuj ĉi fortogigantoj same mikroskopaj kiel la elektronoj en tiuj atomoj, kiuj konsistigas nian karnon kaj sangon, estas mikroskopaj rilate al nia tuta organismo.

### 3. Kaosa konscio kaj kosma konscio

La materiisma mondrigardo de nia tempo, kiu baziĝas sur esploroj de korpoj, organoj kaj partikloj, kaj basiĝas sur mezuri movojn en tempo, spaco kaj substancoj, efektive pli

ĝuste temas pri mortrigardo anstataŭ vivrigardo. Ĝi kultas la morton anstataŭ la vivon kaj vivas surbaze de malvero anstataŭ la vero. Mezuro- kaj pezrezultoj fariĝas nur esprimo por iu loka kaj relativa, kiam oni ne konas kaj akceptas la vivantan "ion", kiu esprimas sin, kreas kaj spertas tra ĉiuj tiuj movoj kaj cikloj, kiujn oni povas mezuri, kaj ankoraŭ pli, kiujn la homo ne povas mezuri. Ĉi tio kompreneble ne temas pri kritiko de la scienco kaj ĝiaj metodoj, kiuj estas granda utilo por la homaro, kaj precipe fariĝas utila, kiam la homo pli altgrade komprenas kiel uzi ĝin favore al la servo de la paco kaj proksima amo. Nur temas pri analizo de la stato de la homaro en mondo, kie la fortoj iras en la direkto al milito, kaoso, eksplodoj kaj kurteckvitoj, kaj koncerne al la reciproka rilato de la aparta homo kaj la reciproka interrilato de la popoloj. La homo sur la tero kreas kaosan staton rilate al si mem kaj siajn ĉirkaŭaĵojn, ĉar ĝi ankoraŭ havas kaosan konscion. La saman konscion oni uzas ankaŭ por esplori vivmisterojn, kaj kompreneble oni ankaŭ en tiu kampo havas inklinon trovi la cirkonstancojn kaosaj. Tio, kion oni vidas, dependas de la okuloj, oni diras, kaj tio ja estas ĝusta, kiam oni scias, ke la okuloj komprenas laŭ tiu konscio, kiu uzas ilin. La kaoso tamen ne ekzistas en la universo, ĝi ekzistas en la homo mem. Sed pere de lerni la kosman strukturon kaj leĝojn de la universo, kiel makro-, mez- kaj mikrokosmaj viveprimoj, la homo havas eblojn, se ĝi povas vivi laŭ la menciitaj leĝoj, ŝanĝi sian konscion al kosma konscio.

### 4. "La homo laŭ la bildo de Dio" ekkreiĝas

La spirita scienco havas la taskon doni al la serĉanta homo komprenon pri interagado inter ĝia propra volo kaj konscio kaj la kosmaj fortoj, kiuj elvolvas en mikrokosmo kaj makrokosmo, tiel ke ĝi pere de logika pensado povas ekkompreni siajn proprajn eblojn kaj konscie labori pri sia daŭriga evoluo. Ni nur bezonas studi la vivesprimojn sur nia propra globo por atingi la komprenon ke nemezureble fortaj kosmaj aŭ universalaj

fortoj dum jarmilionoj prilaboris ĝin tiel ke ĝi povas aperi en tiu laŭcela formo kaj stato, kiun ĝi nun havas hodiaŭ. Kial ĝi estas ronda, kial ĝi turnas sin ĉirkaŭ sia propra akso kaj ĉirkaŭ la suno, kial troviĝas mineraloj, plantoj, bestoj, homoj sur ĝi, kaj kial ekzistas en la homo sopiro pri tio, ke la tero iĝu paca mondo, kie kreiĝas io bela kaj utila por la tuteco? Ĉu estas efiko de hazardaj substancoj, kiuj same bone povus esti alimaniere? Ne, estas rezulto de logika pensado kaj kreado, elvolviĝo de tiu konscio, kiu ekzistas malantaŭ la tuta universo, kaj kiun la homo nomas Dio. De esti fajrooceano la terglobo dum nemezurebla tempospaco ŝanĝiĝis al loĝebla globo por animala vivo kaj loĝejo por la estanta "homo laŭ bildo de Dio". Ĉi tiu laste menciita homo jam ekzistas sur la globo en ia fetostato. Ĝi ankoraŭ ne estas finkreita tiel kiel la globo preskaŭ estas; ĝi ekestiĝas pere de ekkoni sin mem, same kiel ĝi survojas ekkoni la mondon, en kiu ĝi vivas. Ĝi nomas sin mem "homo", ĉar ĝi sentas sin leviĝinta super la aliaj bestoj sur la globo, sed ĝi en la realo ankoraŭ nur estas parte homo kaj parte besto. La globo kaj la homaro tamen nun troviĝas en forcita evoluo, kaj en la daŭro de relative malmultaj jarmiloj ekzistas vivvolviĝo sur ĉi tiu globo, kiu multe superas la sonĝojn de la homoj pri "unu mondo" aŭ "la unuigintaj ŝtatoj de la mondo".

## 5. La neceso de la spiritaj perspektivoj

La solvon de la vivmistero oni ne povas trovi pere de fiksrigardi en la universon al malproksimaj stelbildoj kaj galaksioj, kaj ankaŭ ne pere de trovi la partetojn de la atomkerno. Ĉi tiuj fizikaj perspektivoj tamen estas valoraj stadioj en mondo- kaj vivrigardo, sed ili devas esti plukondukataj per spiritaj perspektivoj, por ke la homo povu sperti tiun realon, en kiu ĝi estas kunlaboranta kaj kunvivanta faktoro. La strukturo de la vivo estas tiom saĝe aranĝita, ke nenio ajn povas resti mistero por la vivantaj estuloj. La vivstrukturo ekzistas en ĉiuj grandecoj aŭ formoj, kaj pere de tio ĉiam ekzistas formato,

kiu akordas kun ĉiu intelekta sensaro. Ĝuste pere de tiu formato de la vivstrukturo, kiu akordas kun nia sensaro ni povas atingi spertadon de la solvo de la vivmistero. Rigardi en la universon estas analoge al rigardi en formaton, kiu estas tro granda, kaj la atomkerno estas tro malgranda. Ni havas la misteron de la universo koncentrita en formato, kiu tute alimaniere kongruas kun nia sensaro, nome en nia propra organismo. Ĝi entenas kombinon de sistemoj, kiu estas analoga al la sistemoj de la universo ekster ni. Ni jam scias, ke ĉiu materio aperas en formo de atomoj aŭ etaj mikrosistemoj, kiuj tute similas al sunsistemoj kaj galaksioj. En la mikromondo la atomoj konsistas el malgrandaj fortocentroj, kiuj havas malgrandajn planedojn aŭ globojn ĉirkaŭ si, kiuj nomiĝas elektronoj. T.e., ke nia organismo ne estas kompaktaĵo, sed konsistas el malgrandaj partikloj, inter kiuj ekzistas malplena spaco, kiu estas multoble pli granda ol la partikloj. Tio denove signifas, ke se ni pensus pri homa organismo pligrandigita tiom multe, ke ĝi fariĝus analoga al nia stelĉielo, ni ne traktus ĝin kiel organismon, sed kiel tute novan stelĉielon kun specifaj stelbildoj kaj sistemoj. Ni pere de pli detala observado povus ekkoni la diferencon inter diversaj sistemoj. Ni vidus, ke la stomako konsistigus sian stelĉielon, la muskolaro sian, la koro-kaj pulmosistemo estus specifa stelsistemo, la cerbo- kaj la nervoregiono alia sistemo, same kiel la seksaj organoj konsistigus kroman sistemon.

## 6. "La malplenspaco" ne estas malplena

Se oni estus incita estulo oni malkaŝus, ke la malplenspaco inter ĉiuj steloj aŭ partikloj nur fizike estas malplena spaco, kaj ke ĝi en la vero estas plena de la vera estulo mem kaj ĝia estulkerno, granda spaco, giganta centrsistemo de altpsika materio. De ĉi tie oni vidus, ke elfluas malaltpsikaj centralglob-sistemoj, t.e., la mikropartikloj en la psikaj organismoj aŭ spiritaj korpoj de la koncerna pligrandigita homo. Tra la malplena spaco oni denove vidus grandiozajn fortofluojn kaj



impulsojn elvolviĝi inter mikropartikloj kaj ĉiu aparte trovi la vojon al la respektive fizikaj sunoj kaj globoj en la sistemo. La inicita observanto observus, ke de tiel nomata malplena spaco la tuta sistemo en la vero fariĝus konservata kaj kondukata. De ĉi tie la rapideco kaj la rotacio de la partikloj fariĝus organizata kaj kontrolata. Novaj fizikaj globoj kaj mondoj estiĝus kaj evoluus, kaj irus en direkto al sia pereco por anstataŭiĝi de aliaj. Ankaŭ videblus por la inicita, ke la impulsoj kaj vivfortoj al la fizikaj partikloj aŭ sunoj kaj globoj, venus de specifa sistemo en ĉi tiu galaksio, nome la konsciorganoj, cerbo kaj la nervoj, kaj kiel ĉi tiuj pensoimpulsoj kreus reagojn en la mikrosistemoj.

## 7 La homo kaj la kosmo

La pensoimpulsoj konsistas, kiel jam analizite en Livets Bog, el la ses bazenergioj, kaj oni vidus, kiel ĉi tiuj energioj ĉiuj havus siajn proprajn sistemojn en la granda galaksisistemo, en kies malplenspaco ili estus la domina vivforto. En la malplena spaco inter la mikropartikloj de la stomakregiono la pezenergio aŭ la mortiganta energio havus sian naturan hejmlokon. Inter la mikropartikloj en la cerbo-, la pulmo-, kaj la sango-regionoj, la sentenergio specialgrade estus la kondukanta forto. En la malplena spaco inter la partikloj kaj la mikrosistemoj de la cerbo- kaj nervsistemo, la inteligentenergio havus sian hejmlokon kiel vivforto, dum la intuicio prezentigis kiel vivforto en la seksaj organoj. La memoro aŭ la dekrystaligoj de la beatenergio formus la fizikajn partiklojn de la skeleto, kaj la instinktenergio estus

la domina forto en tiuj regionoj, kie aperus partikloj, kiuj de mezkosma perspektivo reprezentus muskolaron kaj haŭton. La vivimpulsoj aŭ la pensofortoj kreus nehaltigeblajn ŝanĝiĝojn, la naskiĝo de la mondoj kaj la pereco de la mondoj, inter ĉi tiuj sunoj kaj globoj, kaj ĉio estus regulata de la granda centralglobsistemo, de kie ĉiuj vivoimpulsoj aŭ pensofortoj elradius, tio, kion mi en miaj analizoj nomas la superkonscion, trans kies tiu mio ekzistas, kiu estas la fiksa punkto de la grandioza sistemo, per kies manifestadkapablo la tuto sin montras. Tiuj partikloj, kiuj formas fizikajn materiojn, estas en la vero nur la dekrystaligoj de la pensoenergioj, portempa rezulto de la konscioenergio kaj la kreokapablo de la vivanta estulo. Ĉiuj movoj en ĉi tiu universo estas penso, kaj la loko de la vera vivo estas la malplena spaco inter la partikloj. Kun tiu vivtravivaĵo ni returniĝas al la normala grandeco kaj rigardas la vivon en mezkosmo kaj denove vidas nian konatan malluman noktĉielon super ni kun siaj miloj da lumantaj steloj. Nun estas pli facile kompreni, ke ĉi tiuj esprimoj de vivo, esprimo de konscio, penso kaj volo, kaj tio, kion ni antaŭe kredis esti esprimo de kaoso kaj hazardoj, ni nun povas trakti kiel cirkuladon de vivantaj estuloj ene en vivantaj estuloj, kiuj konsistigas universojn kaj materiojn unu por la alia. Kaj ni povas akcepti la veron en la instruo de nia infanaĝo pri la eterna Dio: "En li, ni vivas, moviĝas kaj ekzistas".

Tradukita el la dana originalo: "Universets mælkeveje"  
Tralaborita de Mogens Møller kaj aprobita de Martinus 1958  
Esperantigita de Helen Claesson 2007



# Tien

Eksterordinara libro de Johan Valano

**Neniam antaŭe okazis** al mi ke mi relegis romanon nur kelkajn monatojn post la unua tralego. Sed pri la romano "**Tien**" de Johan Valano<sup>1</sup> tio okazis kaj nun mi sentas emon skribi kelkajn vortojn pri ĝi al vi kiu eble ankaŭ ŝatus fikcian libron kun multe da bonaj, interesaj, inspiraj kaj pensigaj priskriboj de la vivo.

**La libro temas pri** psikoterapiisto kiu ekhavas eblon viziti "paralelan mondon" kie la homoj vivas en pli da harmonio ol en nia mondo. La ĉefa kialo de tio estas ke ili vere scias kiel nutri sin per bonaj sentoj kaj tial malofte malfeliĉas.

**Dum sia vizito tie** la psikoterapiisto lernas multe pri ilia socio, pensmaniero kaj ankaŭ pri si mem dum spirita travivaĵo gvidita de "jumo" (titolo de *tiea* profesiulo, havanta la taskon regvidi homon al interna ekvilibro, do *tiea* paralelo al psikoterapiisto). La priskriboj de tiuj travivaĵoj kaj lernadoj vere efikas pensige kaj inspire. Estas ĉefe la koncepto pri la "nutrado de bonaj sentoj" kaj la pensigaĵoj pri espero kaj dankemo kiuj influis min multe. Sed ankaŭ la rezonado pri la evoluo de la homaro, la graveco de pardonado kaj la rakonto pri gardanĝeloj postlasis spurojn tre agrablajn.

**La lingvaĵo en "Tien"** estas sufiĉe facila en tiu maniero ke ĉefe kutimaj radikoj estas uzataj. Samtempe ĝi iel estas nefacila kaj eksterordinara. Por mi estas ĝuo legi tekston kun tiom da elegantaj vortkombinoj kaj trafaj esprimoj kiel en la libroj de Piron.



Claude Piron 1931-2008

**Oni rimarkas** en la libro ke la verkisto mem havas multege da spertoj pri la homa psiko en diversaj manieroj kaj tial la legado vere estas interesa. Kaj eble ĝi eĉ helpas iom plibonigi la nutradon de bonaj sentoj en la ĉiutaga vivo...

Hokan Lundberg

Severe deprimita viro revenas resanigita post malfacile kredebla vojaĝo al stranga "paralela mondo", alirebla, laŭ liaj diroj, tra preciza loko en alta montaro. La juna psikologino, kiu prizorgas lin, sekvas liajn spurojn kun la volo certigi, ĉu temas pri realo aŭ fantaziaĵo. Ŝi spertas ion similan. Ĉu ambaŭ estis viktimoj de halucino? La rakontanto, mem psikoterapiisto, sub kies kontrolo la junulino laboras, jen skeptikas, jen emas kredi. La strebo por trovi la veron kondukas lin al malkovroj, kiuj ŝanĝos lian tutan percepton pri la universo... kaj pri si mem. (De la dorsoflanko)

<sup>1</sup> Johan Valano estas pseŭdonimo por Claude Piron

# Interesaj respondoj de Claude Piron

*Kiam mi legis, laŭ mi tre legindan, psikologiromanon, "Tien", de Johán Valano (kaŝnomo de Claude Piron) mi ekhavis multajn demandojn pri la pensoj kaj spertoj de la verkisto.*

*Jen sekvas kelkaj el tiuj demandoj kun interesaj respondoj kiuj pentras pensigan kaj inspiran bildon pri la mensa profundo, el kiu Claude Piron ĉerpas tiujn optimismon, esperon, inspiron, toleremon, feliĉigemon, kiujn respiegulas lia abunda verkaro diversspeca.*

Hokan Lundberg, intervjuinto

## 1. En "Tien" ja temas multe pri spiritaj aferoj, ĉu vi mem havis spiritajn travivaĵojn?

Jes, mi mem havis spiritan travivaĵon, kaj ĉiutage (pli ĝuste, ĝenerale, ĉiunokte), mi ... ĉi tie mankas la vortoj por klarigi... mi diru: mi vizitas spiritan spacon.

## 2. Kiam vi "vizitas spiritan spacon", ĉu tio okazas konscie kaj ĉu vi havas klarajn memorojn pri tio poste? Se jes, kiajn?

Eble la vortoj "viziti spiritan spacon" estas malĝustaj. Mi metas min en specialan, mal-facile priskribeblan psikstaton, mi diru: memhipnotan, kaj tiam travivas meditadoŭn aŭ preĝadon, dum kiu okazas nenio speciala, krom sento de granda paco, kvieto, kaj de kontakto kun Iu altnivela (Dio, verŝajne). Ofte, sed ne ĉiam, mi ricevas indikojn ĉu pri io farinda, ĉu pri io miskomprenata en mia vivo aŭ en la vivo de iu, kun kiu mi rilatas, ĉu pri aliaj aferoj. La sperto povas esti pure "spirita" (senvorta, senbilda, sen aparta sensado), sed ĝi povas enhavi ankaŭ bildojn, iom kiel dum sonĝo, kvankam ĝenerale pli similajn al grandaj simboloj. Estas tre mal-facile priskribi la koncernan travivaĵon. Mi konstatas, ke miaj frazoj tute ne estas adekvataj, sed mi ne scias, kiel pli ĝuste esprimi min. Mi estas konscia la tutan tempon, kaj ĝenerale konservas klarajn memorojn.

## 3. Vi menciis Dion, ĉu eblas klarigi kio Dio signifas kaj estas por vi?

Ne estas facile klarigi tion, ĉar Dio estas trans ĉio, al kio taŭgas homaj vortoj kaj konceptoj. Jam la kutimaj pronomoj ne taŭgas,

pro tio, ke Dio estas nek "Li", nek "li", nek "ŝi", nek "ĝi". Tial mi uzos la pronomon "di", neologismon, kiu laŭ mi estas la sola akceptebla. Kio sekvas, tio montras, ne tion, kio Dio estas, sed kion (kiun) mi perceptis, renkontis, ekkonis.

La devo pri intelekta honesteco devigas min agnoski, ke eble temas nur pri imagaĵoj, halucinoj, deziroj, kaj ne pri iu reala. Sed mia plej profunda sento estas, ke temas pri realaĵoj, ke tiu, kiun mi ĉi-sube iom priskribos, estas iu reala, kun kiu mi aŭtente rilatas.

Laŭ tiuj, eble eraraj, spertoj, Dio estas iu, ne io. Di ne estas abstrakta principo, aŭ ia Forto sen personeco. Estas estaĵo, kiu vivas, konas, scias, perceptas, sentas kaj rilatas kun la kreitoj/kreatoj. Ĉio, kion oni povas diri pri di, estas kiel fuŝa traduko rilate al la originala teksto. Tamen fuŝa traduko donas ian ideon pri la originalo kaj estas pli bona ol neniun traduko.

- Dio ne havas limojn. Tio signifas, ke di estas en ĉio, amas ĉiun, eĉ plej etan insekton, kiu vivas ne pli ol 24 horojn, eĉ unu etan petalon de unu eta floro sur eta planedo, kie nenu, krom di, iam ajn vidos ĝin.
- Dio estas kreanto de libero. Esti libera, tio signifas havi la povon decidi fari ion stultan aŭ aĉan. Dio estas en ĉio, do ankaŭ en heroino kaj kokaino. Di estas ankaŭ en la homoj, kiuj sorbas tiujn. Sed tion ili faras pro sia (ne dia) libera elekto. Dio estas ankaŭ en la sufero, kiu rezultas.
- Se la kreitoj ne povus elekti aferojn stultajn aŭ aĉajn – decidi diri "ne" al Dio, kriaĉi al di "Merdon!" – ili ne estus liberaj, ili estus kiel aŭtomatoj kapablaj fari nur tion, kion Dio programis por ili. Ili estus do



kvazaŭ parto de Dio, ne apartaj estaĵoj.

- Dio kreis / as / os nenion aĉan. Malbono aperas, kiam io ne estas je sia ĝusta loko. Kafo en mia taso estas io bona. Kafo sur mia pantalono ne estas io bona: eĉ ne plu estas kafo, estas makulo. Heroino per si mem ne estas io aĉa. Sed kiam ĝi detruas homon kaj riĉigas mafion, ĝi ne plu plenumas sian rolon, ĝi ne plu troviĝas ĝustaloke, kaj malbono rezultas. Same estas kiam forto, kio estas io bona, fariĝas perforto.
- Dio estas amo. Dia naturo estas ami. Oni ne povas ami, se ekzistas neniu. Tial la kristana / hinda ideo pri Dio samtempe unu kaj tri aperas al mi tre verŝajna. Tial ankaŭ Dio kreas. Krei, tio estas, fare de Dio, esti igi ion aŭ iun, kiu ne estas di.
- Dio estas tiu, kiu estas pli ... ol ni povas imagi, kondiĉe ke post tiu "pli" oni metu vorton, kiu neniam povu elvoki mankon de amo, respekto, kompreno: Dio estas tiu, kiu estas pli amoplena, pli komprenema, pli amika, pli bela, pli forta, pli senperforta, pli ĝoja, pli arta, pli diskreta, pli plena je respekto, konsidero, estimo, pli kunludema, pli humura, pli renoviganta, pli alloganta al si, ktp senfine, ol oni povas imagi.
- Dio estas kiel la sango en la homo. Nur dank' al ĝi ni povas vivi, sed ni kutime ne vidas ĝin, kaj kiam ni vidas ĝin, tio signas, ke okazis io nenormala, kaj ni emas timi. La sango nutras kaj purigas, kiel patrino bebon. Same Dio en ni. La sango estas ni, kaj tamen ne estas ni.
- Dio estas tiu, kiu estas en mi pli mi ol mi, pli vera mi, pli vere mi mem, ol mi (ol mia libera kaj perceptata mi). Iel, mi kaj vi kaj ĉiuj estas la mano de Dio, la buŝo de Dio, la okuloj de Dio, ktp, kun tiu diferenco, ke Dio akceptas, ke tiuj ne agu nur laŭ diaj ordonoj, di lasas ilin liberaj.
- Nun kiam mi tajpas ĉi tion, Dio fakte tajpas. Sed ĉar di estas perfekta kaj mi vivas sur planedo, sur ekzistonivelo, sur kiu nenio estas perfekta, mi nevole pli malpli fuŝas diajn fingromovojn (aŭ pli ĝuste cerbomovojn) kaj la mesaĝo, kiun vi ricevas, ne estas la perfekta dia mesaĝo, nur iom (eble tre) malbonigita versio de ĝi.

- Di kondukas la kreitojn / kreatojn al feliĉo, sed ne rapide (nur tiu nerapideco ebligas al la libereco funkcii). Di havas eternecon (t.e. senfinon da tempo) por ke ni atingu din, kiu estas la senfina vivo kaj feliĉo.
- Dion ni vidas kaj aŭdas kaj gustumas kaj flaras konstante, sed la plimulto el la homoj tion ne perceptas. Kiam mi vidas ion belan, mi vidas Dion en tiu belaĵo. Kiam mi vidas iun suferantan, mi vidas Dion suferantan en tiu estaĵo. Dio solidaras kun ĉiu el ni, kaj do partoprenas en ĉiu sufero, kio ne malhelpas din plene feliĉi. (Homo, estaĵo ege limigita, kapablas samtempe feliĉi kaj senti doloron; Dio same, sed multe pli, ĉar di ne estas limigita). La kapablo percepti belecon, ĝui pri mirinda pejzaĝo, aŭ muziko, aŭ ies rideto, estas ioma partopreno nia en la dia vibrado en ni.

Mi povus paroli pri Dio dum horoj kaj horoj, kaj tamen ĉiufoje preterlasi ege gravajn aspektojn. Mi do finas nun, sed ne ĉar la temo estas elĉerpita.

#### **4. Ĉu viaj spertoj pri Dio venis al vi dum "ekbrileto" aŭ ĉu ili evoluis dum longa tempo en vi?**

Nek unu nek la alia. La unua renkonto estis longa kontakto. Mi provos rakonti, sed estas ege malfacile, ĉar tia sperto similas nenion, por kio vortoj ekzistas.

Mi tiutempe laboris en Monda Organizo pri Sano. Dum kafaŭzo, mi diskutis kun kolegoj, ĉiuj ateistoj, kaj unu diris: "Dio estas nur la produkto de homa imago". Reveninte hejmen, mi je la kutima horo enlitiĝis kaj ekdormis, sed iam, dum la nokto, mi vekigis, kun tiu frazo ripetiganta en mia kapo. Tiam mi subite sentis min transportita al alia ... kiel diri? ...dimensio, sfero, universo. Mia korpo kuŝis en la lito, kaj mi iel sentis ĝin, kaj sentis la korpon de mia edzino apud la mia, sed mi (mia persono) ne plu estis en ĝi, sed en alia loko. Kaj jen mi devis elekti inter du ebloj: ĉu "Dio estas la produkto de homa imago" ĉu "Homo estas la produkto de dia imago". La stranga afero estis, ke mi vidis

ambaŭ elekteblojn, kaj tamen mi vidis, ke nur la dua estas vera. Sed la fakto tion konstatas ne forprenis la devon decidi favore ĉu al tiu, ĉu al la alia. Alivorte mi havis la liberon mensogi al mi, trompi min, preferi ion neveran al io vera, sed, ial, apenaŭ elportebla.

En tiu momento, mi "vidis" Dion. La vorto ne estas ĝusta. Mi nenion vidis, aŭdis, tuŝis aŭ flaris. Mi diru: Dio ekevidentiĝis al mi. Kvankam mi ne "vidis" din, propraŭsence, mi perceptis din kun pli da klareco ol mi nun vidas la literojn tajpatajn sur la komputila ekrano. La certeco, la klareco, la evidento estis pli granda ol pri iu ajn alia afero, kiun mi perceptis en mia tuta vivo. Dum la tuta travivaĵo, kiun mi subjektive sentis kvazaŭ jarcentojn longan, Dio troviĝis antaŭ mi, plej konkrete. Kaj mi volis murdi din. Mia reago surprizis min tiom, kiom min surprizis la subita ekmontriĝo de Dio. Post minuto da konfuzo, kreita de tiu ekaperado, mi sentis nedireble fortegan deziron, ke tiu Dio ne troviĝu antaŭ mi, simple ne ekzistu. Estis vera mortigdeziro. Ĝi estis tre primitiva, besta, prahoma, mi ne scias, kiel priskribi ĝin. Sed ĝi estis ege forta. Mi vidis Dion, mi vidis, ke di ekzistas, kaj mi samtempe volis, ke mia konstato estu erara, mi volis forviŝi ĝin, mi volis, ke anstataŭ Dio estu nenio. Kvazaŭ ekzistis nur du ebloj: ĉu Dio ekzistas kaj mi ne, ĉu mi ekzistas kaj Dio ne. Mi sentis tiun streĉiĝon inter mia konstato kaj mia volo kiel neimageble longdaŭran luktheadon. Mi ne luktitis kontraŭ Dio, kvankam iusence tion mi sentis, mi luktitis kontraŭ mia konstato. Mi rifuzis ĝin. Mi sentis ĝin terura minaco, neakceptebla. Kaj samtempe mi furiozis, ke mi luktas kontraŭ mi kaj ne kontraŭ Dio, kiu nur rigardis min, ame.

Tiu "rigardo" de Dio al mi estis ege klara. En ĝi estis senfine da amo, kompreno, solidareco, kunsento, kunvibro, respekto. Respekto al mia rajto elekti laŭvole, do respekto al mia libereco, el kiu fontas – tion mi sentis treege klare – mia digno. Tiu rigardo samtempe ege plaĉis kaj malplaĉis. Ĝi parte vekis esperon kaj konsolon, parte furiozigis min. Tiom da bonkoreco en iu, kiun mi volis elimini, estis neelportebla.

Finfine, mi elektis akcepti la realon de Dio, kaj la fakton, ke mi estas produkto de dia imago, kaj do ke mi ne estas per mi mem. Ŝajnas, ke, antaŭ tiu akceptmomento, io en mi rifuzis esti kreita / kreata. Kiam mi akceptis, mi sentis, kvazaŭ mia animo kliniĝas, kaj tuŝas la grundon per la kapo, kiel islamanoj dumpreĝe. Mi adorkliniĝis, laŭ la zamenhofa vorto. Tiam invadis min sento de eksterordinara paco, feliĉo, ĝojo, kian mi neniam spertis iam ajn antaŭe en mia vivo, ĝojo tamen tre kvieta. Tiam mi sentis, ke mi devas ŝanĝi mian vivon. Mi ankoraŭ estis tradukisto tiutempe. Fariĝis klare al mi, ke mi de nun devos vivi vivon pli utilan, esti je la servo de la aliaj, de la plibonigo de tiu parto de la homaro, pri kiu mi povas fari ion. Tial mi ŝanĝis la profesion, studis psikologion kaj trejniĝis kiel psikanalizisto kaj psikoterapiisto. Pli kaj pli mia klientaro konsistis el homoj, kiuj bezonas helpon en la sfero, kie la psika vivo kuntuŝiĝas kun la spirita, kie ambaŭ interkovriĝas. Tre ofte mi sentas, ke ne hazarde homo petas psikohelpon ĝuste de mi, kaj ne de kolego, sed pro ia interveno de spirito.

Post tiu unua kontakto kun Dio, mi facile kutimiĝis kontakti din ĉiutage. Kelkfoje estas tre facile, aliffoje ne. Kelkfoje mi provas kontakti din, sed havas la impreson, ke mi sukcesas atingi nur sanktulon aŭ anĝelon aŭ alian spiritan estaĵon, sed ree la vortoj mi-straŭfas, ĉar mi ne scias, kun kiu ekzakte mi ekrilatas tiakaze, kaj aliflanke mi sentas, ke Dio estas en ili kaj agas tra ili. Mi nur provas diri, ke jen mi havas senton pri tuja kaj rekta kontakto kun Dio, dum aliffoje, ŝajnas, ke mi atingas din nur tra iu alia libera estaĵo, kiu agas relakse. Sed ankaŭ mi fojfoje sentas, ke mi estas relajso por Dio aŭ por alia spirita estaĵo, kiu mem peras Dion, aŭ peras alian, kiu peras alian, kiu peras Dion laŭ kelkfoje tre longa ĉeno.

Ĉar mi konstante rilatas kun Dio, mi pli kaj pli malkovras din. Mia percepto do ne estas io stabila, senŝanĝa, mi trovas konstante novajn aspektojn, pri kiuj mi havis nenion ideon antaŭe, eĉ post la travivaĵo ĉi tie raportita.

Ĉio ĉi estas granda mistero, ĉu ne?

## **5. En la historio de "Tien" la ĉefpersono unufoje renkontis gardanĝelon, ĉu vi mem renkontis gardanĝelon?**

Mi havas bonan rilaton kun mia gardanĝelo. (Mi uzas singularon, kvankam ŝajnas, ke pluraj estaĵoj – eble eĉ multaj – ludas tiun rolon). Mi ne scias, ĉu la vorto "renkontis" taŭgas. Mi perceptis ĝian agadon.

## **6. Kiel vi perceptis ĝian agadon?**

Jen unu ekzemplo. Kiam mi estis 25-jara, aperis anonco, ke UN volas dungu tradukistojn. Kvankam mi sciis relative bone la anglan, mia nivelo tute ne estis profesia, multe mankis ĝis tio. Tamen mi sentis fortan kaj nekompreneblan impulson kandidatiĝi. La dungado okazis surbaze de konkurso. Kiam mi alvenis por la konkurso, mi eksciis, ke enskribiĝis 250 kandidatoj. Mi aŭdis ilin paroli inter si (multaj jam konis sin reciproke) kaj konstatis, ke preskaŭ ĉiuj estas pli aĝaj ol mi kaj havas universitatan diplomon pri la angla (kion mi ne havis). Ili aspektis kiel pli seriozaj kandidatoj. La konkurso konsistis el francigo de angla teksto. En tiu teksto estis kelkaj vortoj, kiujn mi ne komprenis. Dank'al la kunteksto mi sukcesis diveni la probleblan sencon de ĉiuj, krom unu. Restis do unu frazo, kiun mi povis traduki en du sinkontraŭdiraj manieroj. Nenio ebligis diveni, ĉu ĝi signifas tion, aŭ la malon. Ĉar mi ĉiaokaze ne imagis sukceson ebla, ne gravis al mi. Mi elektis unu el la du ebloj hazarde kaj decidis, ke mi sufiĉe penis super tiu teksto. Mi do komencis paŝi por redoni mian folion. Tiam mi sentis, kvazaŭ mano tuŝus mian ŝultron, kaj voĉo flustris: "reiru al via loko, forstreku tiun frazon kaj metu la malon de tio, kion vi elektis." Mi turnis min. Staris neniun malantaŭ mi.

Mi faris laŭ tiu stranga instrukcio donita de neniun videbla. Eble mi devas precizigi, ke tio okazis la daton de mia naskiĝtago. Post kelkaj monatoj mi troviĝis en UN, en Novjorko, kiel tradukisto.

Mi poste diskutis kun unu el la personoj,

kiuj selektis la kandidatojn surbaze de tiu traduko. Mi tiel eksciis, ke la unua kriterio estis: perfekta redono de la senco de la teksto. Mi diris al li: "Do, se mi enmetus eĉ nur unu frazon, kiu estus mistraduko, mi estus forĵetita, ĉu ne?". Li diris al mi: "Efektive, pro nur unu miskompreno vi ne estus selektita".

Multo en mia vivo estus alia, se tiuepoke mi ne iĝus UN-tradukisto en Novjorko. Por mi ne estas dubo, ke mia gardanĝelo intervenis.

Mi povus citi aliajn okazojn, ekzemple pri absolute neprobabla evito de aŭtoakcidento, aŭ similaj aferoj. Sed ĉi tiu espereble sufiĉos.

## **7. Kion vi pensas pri karmo kiel la pedagogio de Dio?**

Mi kredas je karmo kiel dia pedagogio, sed mi konstatis, ke la karmokoncepto tre ofte estas miskomprenata kaj misuzata. En Hindio ĝi fariĝis preteksto por eviti ĉian socian helpon al mizeruloj ("ili ja suferas pro sia karmo, estus malutile helpi ilin").

## **8. Ĉu vi ankaŭ kredas je reenkarniĝo?**

Jes, mi kredas je reenkarniĝo. Fakte granda parto de mia vivo estis direktita de la fakto, ke, kiel infano, mi havis memorojn pri antaŭa vivo, sed neniun kredis min. Tial mia rilato al la vero estis vere suferiga. Se mi estis sincera, oni diris, ke mi mensogas (aŭ fantazias), kaj oni devigis min nei miajn spertojn kaj nomis tion sincereco, dum mi sentis min trompulo. Parte tial mi studis profundpsikologion. Sed, se esti tute sincera, mi konfesu, ke tiaj kredoj (ankaŭ pri karmo) ne estas plene stabilaj en mi. Dum plejparto de la tempo mi kredas je ili, sed alvenas momentoj, kiam mi pensas: "ĉio ĉi estas fantazio, deliro, neebla..."

## **9. Kia estis via antaŭa vivo laŭ la memoroj de via infanperiodo?**

Fakte mi havis memorojn pri pluraj antaŭaj vivoj, kiel infano. Sed mi nun ne plu memoras rekte ilin, mi memoras nur miajn tiamajn

memorojn, dirojn, pensojn, suferon pri tio, ke ne eblis komuniki kaj esti prenata serioze. La ĵus antaŭa vivo estis kiel tre mizera kaj malfeliĉa knabo en Ĉinio. La plej klara memoro estis pri mia morto, sur tegmento, dum iu batalo (ĉu kadre de milito, ĉu de konflikto inter du bandoj, mi ne scias). Mi mortis pro kuglo. Mi estis tre juna, inter 18- kaj 20-jara. Mi supozas, ke estis dum la jaroj 1920-aj, sed mi ne havas certecon pri tio, same kiel mi scias nenion pri la loko, kvankam, kiel infano, mi tre bone memoris la detalojn de la ĉirkaŭaĵo.

### **10. Ĉu vi, laŭ viaj memoroj, ĉiam estis viro dum la enkarniĝoj?**

Jes.

### **11. Ĉu vi havas ideon pri kial nur kelkaj havas memorojn pri antaŭaj vivoj?**

Ne. Mi opinias, ke normale oni devus ne memori antaŭan vivon. Sed sur nia planedo, nenio estas perfekta. Tiu leĝo do ne funkcias centprocente. Homoj kun tia memorado apartenas al la eta proporcio da fuŝoj, aŭ pli ĝuste da tre neprobablaj kazoj, kiuj troviĝas en ĉia statistikado. Ŝajnas tamen, ke homoj havas pli da ŝancoj konservi tian memoron, se ili mortis junaj kaj perforte. Ŝajnas ankaŭ, ke tiaj memoroj ĝenerale forsvenas post la aĝo de ses jaroj. Tio al mi okazis.

### **12. Vi diris ke vi multe suferis pro viaj antaŭvivaj memoroj, sed ĉu ili ne ankaŭ donas al vi ion pozitivan?**

Mi ne diris, ke mi suferis pro miaj antaŭvivaj memoroj. Mi suferis, ĉar oni ne volis kredi min kaj trudis al mi konfesi pri mensogo, dum por mi estis ne elpenŝaĵoj, sed simpla vero. La sufero rilatas nur al la reago de la medio, ne al la memoroj mem. Ĝin kaŭzis ankaŭ la strangaj opinioj pri la ĉinoj. Ankoraŭ nun, mi sentas ian ekkoleretan reagon, kiam oni nomas orient-azianojn flavaj. Fakte, granda parto de mia nuna feliĉo ŝuldiĝas al la fakto, ke – eĉ se miaj memoroj nun estas nur memoro de perditaj memoroj, kaj

do tre nebulaj – la ĝenerala impresio pri tiu antaŭa vivo estas pri vivo en tiel suferigaj kaj mizeraj cirkonstancoj, ke kompare kun ĝi, eĉ plej gravaj nunaj malagrablaĵoj estas nenio. Mi konstante miras, kiel malmulte la homoj en niaj landoj alte taksas sian privilegian situacion. Kaj poste mi komprenas: ili ne havas referencan vivon por kompari.

### **13. Ĉu vi estas ano de iu religio?**

Jes. Mi estas katoliko. Sed estas malfacile ne miskomprenigi min tiurilate. La katolika religio estas tre malsama laŭ la lokoj. Ekzemple, la katolikismo en Italio sentiĝas al mi kiel io ege diferenca de tio, al kio mi kutimas. Ĝi estas fakte alia religio. Por mi, katolikismo estas duopa. Ekzistas unu katolikismo oficiala kaj institucia, kun dogmoj, ordonoj de Romo, tuta burokrataro tie kaj ege arbitraj decidoj. Sed kunekzistas kun ĝi alia katolikismo, kiu konsistas el ritoj, tradicioj, spirito, maniero kompreni la Ĉielajn realaĵojn, kaj ĉefe el homoj, kiuj tute ne nepre aprobas la romajn decidojn kaj arbitran aŭtoritaton. Mi apartenas al tiu neoficiala, nepublika katolikismo (kiel almenaŭ 80% el la katolikoj, kiuj loĝas en mia regiono, kaj eble en la tuta franclingvio). Kion mi tre ŝatas en la katolika religio, tio estas la tre alta homa kvalito de multaj el la pastroj kaj monaĥoj. Mi havas multajn bonegajn amikojn inter ili, kaj ili aperas al mi aparte profundaj, bonkoraj, humilaj homoj. Ankaŭ en la katolika religia literaturo estas multegaj verkoj, kiuj kondukas al pli bona vivo, pli bona kono de Dio. Tial, kvankam mi ne prenas tre serioze la paŝon kaj lian medion, nek la oficiale difinitan katolikan moralon, aŭ regulojn kiel tiun pri pastra senedzineco, mi restas fidela al la katolika religio, kiu estas la religio de mia infanaĝo.

Kompreneble, ĉar mi kredas je reenkarniĝo, mi estas iusence herezulo. Sed mi kredas, ke preskaŭ ĉiuj katolikoj estas herezuloj pri io aŭ io alia.

Cetere, mi bezonas ritojn kaj partoprenon en la vivo de religia komunumo. Sed mi ne kredas la katolikan pli altvalora. Kelkrilate mi estas tre proksima al hinduismo kaj bud-

hismo, ankaŭ al diversaj formoj de animismo kaj ŝamanismo. Mi havas grandan respekton por bahaanoj. Mi parte apartenas ankaŭ al la juda tradicio kaj forte kunvibras kun ĝi (ne kun la plej ortodoksa formo). Kvankam mi havas bonegajn rilatojn kun multaj protestantoj (fakte, mi psikoterapiis plurajn protestantajn pastor(in)ojn), mi tamen sentas protestantismon tro racia, tro intelekta; mankas al ĝi ia mistera, simbola etoso, io malfacile difinebla, kion mi trovas en preskaŭ ĉiuj aliaj religioj. Sed protestantismo rapide ŝanĝiĝas tiurilate. Islamo estas religio, kiun mi ne konas kaj kun kiu mi neniam havis kontaktojn (krom unu amiko, kies profundan, aŭtentan rilaton al Dio mi ege respektis).

Mi kredas, ke se oni enprofundiĝas en sia religio, oni pli kaj pli proksimiĝas spirite al aliaj homoj, kiuj ankaŭ enprofundiĝas en sian religion. Mi sentas min pli proksima al profunda budhano, aŭ al la islamano, al kiu mi ĵus aludis, ol al multaj supraĵaj katolikoj, kiuj teorie estas miaj samreligiojanoj.

#### **14. Kion vi pensas pri la homaranismo'?**

De tre longe mi legis nenion pri homaranismo, sed mi ĉiam plene aprobis ĝin.

#### **15. Kion vi pensas pri Zamenhof?**

Miaopinie, Zamenhof estis la plenumanto, verŝajne nekonscia, de iu aganta sur pli alta nivelo, kiun mi emas nomi la anĝelo Esperanto (aŭ Esperulo aŭ io simila). Tio ne signifas, ke li ne devis multege peni por realigi la ideon kaj perfektigi la projekton. Li devis. Kiam oni estas inspirata, oni estas iel gvidata, sed devas ege koncentri sin, kaj senĉese rekorektadi sian verkaĵon, por proksimigi ĝin pli kaj pli al tio, kion oni sentas kiel la celon, difinitan de iu alia ol ni, almenaŭ ol nia egoo. Alivorte, oni havas nebulan senton pri la celataĵo, kaj oni devas iom post iom pliprecizigi ĝin, sciante, ke oni neniam plene atingos ĝin. Mi kredas, ke tiel Zamenhof agis.

Cetere, li estis nekutime psike matura homo, kun tre malofta perfekta ekvilibro inter la du duoncerboj. Kaj li estis ege

bonkora, honesta kaj humila (en tre pozitiva senco de tiu vorto), kiuj estas kriterioj de iu kun bonaj rilatoj kun la Ĉielo. Ke li estis miskomprenata, mokata, kaj multe suferis, tio estas ankaŭ oftaĵo ĉe tiaj homoj.

Diversaj detaloj de la lingvo igas min kredi, ke ĝia vera origino estas superhoma. Ekzemple la "mal"-vortoj, kiuj referencas al bono, kiam oni parolas pri io malbona. Aŭ la fakto, ke la parolo de Kristo: "Mi estas la vojo, la vero, la vivo" sonas tiel kiel belega formulo, kun tia paraleleco inter la silaboj, dum certe Zamenhof, nekristano, ne elektis la koncernajn radikojn prepare al la esperantigo de tiu frazo. Simile impresas la fakto, ke "amen", en esperanto, signifas "direkte al amo", kaj la fakto, ke e-o utilas por faciliigi kaj plibonigi la dialogon inter malsimilaj homoj, kaj ke en tiu lingvo la vorto "dialogo" sonas ekzakte kiel "dia logo" (Dio allogas la homojn al si per sincera, senbara, egaleca dialogad).

#### **16. Kion vi pensas pri la hodiaŭa esperanto-movado?**

Mi ne havas speciale interesajn pensojn pri la e-movado. Mi dirus, ke ĝi estas multe pli diversa ol e-istoj ĝenerale imagas. Ĝi kreis ion iom similan al diaspora popolo, kiu vivigas la lingvon uzante ĝin kaj verkante en ĝi, kiu analizas la problemojn de lingva komunikado, kaj kiu provas konvinki la ceteran mondon pri la boneco de sia lingvo. Mi kredas, ke ĝi longperspektive, ĝenerale progresas (kun sinsekvo de partaj progresoj kaj malprogresoj, kiel en la plimulto el homaj evoluoj) laŭ la malrapida ritmo de historio, de sociaj fenomenoj, kaj de ege pacienca Dio, kiu havas eternecon pro plenumi siajn projektojn.

En n-roj 4-5 kaj 6 de "Heroldo" ĉi-jara (98.04.15 kaj 98.05.30) aperis mallongigita teksto de prelego mia pri "Psikologiaj aspektoj de la monda lingvoproblemo kaj de Esperanto". Ĝi povus interesi la legantojn de retkosmo. (Ankaŭ troviĝas ĉe <http://members.aol.com/sylvanz/pirprel.htm>)



## **17. Ĉu vi ricevis indikojn de la spirita mondo ke vi havas gravan rolon por Esperanto?**

Ne. Sed nun, kiam mi estas 67-jara, kaj re-rigardas al mia vivo, ĝi ŝajnas tiel laŭcele aranĝita por ke ĝi utilu ĉefe al e-o, ke estas malfacile eviti la konkludon, ke la afero estis organizita de alte. Sinsekvo de hazardoj kaj de decidoj faritaj sen speciala atento al tiu celo faris, ke mi atingis malofte renkonteblan nivelon de kompetenteco pri monda lingva komunikado, ĉar mi enprofundiĝis, ne (nur) teorie, sed pro la cirkonstancoj de la vivo, en multaj el ĝiaj aspektoj: ekonomia, politika, socia, psikologia, lingvistika, pedagogia, ktp, dum ĝenerale fakuloj pri lingva komunikado kompetentas pri nur unu aŭ du el tiuj aspektoj, kaj ofte ne pro propra longa laborado surterena.

Alia faktoro, kiu igas min akcepti la ideon de influo de la spirita mondo estas la nekredebla forto, kiu puŝas min al laborado tiukampe. Ek de mia infaneco, mi neniam povis ĉesi agi pri kaj por kaj per esperanto. Oni povus nomi tion obsedo (same pri Zamenhof), sed mi estis dufoje longe psikanalizata, mi ricevis la rajton praktiki psikoterapion post funda psika esploro, kiu konkludis je mia plena mensa saneco. Laŭ la kutimaj kriterioj mi efektive estas mense sana, kaj ne montras la negativajn aspektojn de patologia obsedo. Temas do pri io alia, kion mi sentas, kiel venantan "de alte". Tiu forto estas tre intensa, potenca, sed ĝi respektas mian liberecon. Mi scias, ke mi povus diri "ne" al ĝi. Sed plaĉas al mi sekvi ĝin, labori laŭ ĝi igas min feliĉa, kaj ofte e-istoj, kiuj legas miajn verkojn aŭ aŭskultas min prelegi, poste diras al mi, ke mi helpis ilin pli feliĉi. Tio por mi konfirmas, ke, se mi lasas tiun forton puŝi min, kien ĝi volas, mi agas laŭ la volo de Dio. Eble ankaŭ la fakto, ke per e-o mi neniam gajnis monon, igas tiun interpreton pli probable. Simile, la konstato, ke mi sentas nenium apartan fierecon, nenium superecon, pro tiu kompetenteco kaj kapablo feliĉigi, sed sentas min simpla homo ne pli valora ol la lingve plej sentalenta eterna komencanto, agas kiel konverĝa probabla

faktoro pri tiu maniero vidi mian e-istan vivon.

## **18. Ĉu vi estas la verkisto pri kiu vi skribas en la fino de via libro "La bona lingvo"?**

Tion mi ne povas scii. Aŭtoro neniam povas juĝi sin. Al mi ne gravas. Mi verkas kiel eble plej honeste, bele, sincere, interese, sed mi estas homo, kaj do tre limigita. Mi ne povas scii, kigrade mi atingas la nivelon, pri kiu mi aludis en "La bona lingvo". Tion nur la publiko povas decidi.

## **19. Kiel vi povas esti tiel certa ke venos tia verkisto kian vi priskribas en "La bona lingvo"?**

Mi ne estas centprocente certa. Tio ŝajnas al mi ege probable, ĉar kiam lingvo vivas tiel vigle, kiel la nuna esperanto, kun diversaj amatoraj verkistoj, la probableco estas granda, ke unu el tiuj estos malpli amatora ol la aliaj. Ankaŭ ĉar estas ekonomia leĝo, ke, kiam estas forta espero pri iu varo, iu finfine produktos kaj ofertos tiun varon. Sed eble mi plene eraras.

## **20. Mi aŭdis ke vi skribis dikan libron pri lingvistiko kaj esperanto en la franca, ĉu ĝi venos ankaŭ esperante?**

Mia franclingva libro ne temas pri lingvistiko, nur pri la monda lingvo-problemo, kaj e-o kiel ties plej "mensesana" solvo. Fakte ĝi estas pli psikologia ol lingvistika. Ĝi grandparte baziĝas sur mia sperto kiel iama tradukisto kaj mia deinterna kono de instituciaj lingvaj servoj, kaj de la ebloj pri lingvoinstruado. Mi ne scias, ĉu ĝi iam aperos en esperanto. Mi komencis traduki ĝin, sed tio estas tro temporaba laboro. Mi atingis nur la komencon de la dua ĉapitro, kaj tio estis antaŭ tri jaroj. De tiam mi ne plu trovis la tempon labori super ĝi. Mi bezonus almenaŭ tri paralelajn vivojn por fari ĉion, kion mi devus fari.

Vi trovos tre objektivan recenzon pri tiu libro, verkitan de Robert Philippon, profesoro pri lingvoj en la universitato de

Roskilde (<robert@babel.Ruc.Dk>), kiun mi persone ne konas, en "Language in Society", 26:1 (1997), pp. 143-147.

## 21. La plej "mensesana" solvo vi diris, ĉu tio signifas ke vi kredas ja "la fina venko"<sup>3</sup>?

Al mi ne tre plaĉas la vorto "venko", kiu elvokas, ke iuj gajnas kaj aliaj perdas, kvazaŭ estus superuloj kaj malsuperuloj. Mi kredas, ke ĉiuj gajnos per la akcepto de esperanto. Mi kredas ankaŭ, ke iam esperanto efektive estos la ĝenerala komunikilo inter malsamlingvanoj. Oni povas antaŭvidi tion, kiel oni povis antaŭvidi la finan alprenon de arabaj/hindaj ciferoj kaj praktikan forlason de la romiaj, kiel oni povis antaŭvidi la forlason de la malnovaj mezurunuoj favore al la pli oportuna decimala kaj metra sistemo. Sed eble mi eraras.

## 22. Ŝajnas al mi ke viaj sperto kaj kredo vere kongruas kun la

## Kosmologio de Martinus. Ĉu vi interesiĝas pri la verkaro de Martinus?

Mi scias pri la ekzisto de la verkaro de Martinus, sed ne vere pri ĝia enhavo. Mi interesiĝas pri ĝi, se mi disponus pli da tempo, kaj mi ne mirus, se ĝi tre kongruus kun miaj kredo kaj sperto.

Se la legantojn interesas scii pli pri miaj ideoj kaj spertoj en la spirita kampo, ili povas demandi pli.

- 1 Homaranismo - La projekto de Zamenhof pri "interhoma filozofio", entreprenata kiel nepra aldono al la "internacia lingvo". Z verŝajne opiniis ilin ambaŭ same esencaj eroj de estonta tuttera paco.
- 2 "La bona lingvo" - Libro verkita de Claude Piron pri la indeco de E-o el vidpunktoj kaj strukturaj kaj humanismaj.
- 3 La fina venko - la ideo ke Esperanto fariĝos en ia formo rekonata monda lingvo, sed la nocio "fina venko" pro historiaj kialoj foje estas vidata kiel esprimo de fanatikeco, particeo ks.

Retpoŝte demandis kaj redaktis Hokan Lundberg kun ioma helpo de Henning von Rosen.

---

# Fabeloj kaj kosmologio

Harry Rasmussen

Kiel mi menciis en mia dana libro, "H.C.Andersen, H.C.Ørsted kaj Martinus" 1997 la baza ideo de Martinus estas, ke la klasikaj fabeloj temas pri bazaj kosmaj realaĵoj, leĝoj kaj principoj. Sed nur homoj kun sufiĉe altevoluita etik-morala kaj intelekta konscio povas kompreni ilin. Pro tio la fabeloj estas kreitaj en formo, kiu turnas sin al, kaj volas esti komprenata de la kosme ankoraŭ nekonscia homo. Tio signifas "la infano" en litera kompreno kaj "la infano en la evoluo": La naturhomo kaj la neintelektala sentohomo. <sup>(Noto 1)</sup>

Kiel estas skribita en la Kosmologio de Martinus la homoj troviĝas sur diversaj mensaj evoluŝtupoj al "kosma konscio", kie kelkaj troviĝas sur pli malaltaj kaj aliaj sur

pli altaj ŝtupoj. Tiu gradaro Martinus nomas "evoluŝtupetaro" aŭ "la vojo al la lumo". Sed la homaro reprezentas "nur" tiun parton de la "ŝtupetaro", kiu entenas la lastan duonon de la animala regno kaj la plej unuan parton de la vera homa regno. Tiuj du superaj ŝtupoj estas klasifikitaj en vico de karakterŝtupoj, nome tiuj ŝtupoj, kiuj konsistas el la konsciokategorioj de la homaro kaj iliaj subsekcioj. Ili etendiĝas de la plej primitiva naturhomo al la plej alte evoluinta kulturhomo. <sup>(Noto 2)</sup>

## La humana kapablo

Kiel ni ankaŭ konstatis, Martinus mezuras la homan evoluon surbaze de etik-morala stato, kiun li ankaŭ priskribas kiel "la humana kapablo". Tio signifas tiu kapablo, kiu

respondeas pri tio, kion homo ŝatus aŭ ne ŝatus fari al siaj kunhomoj kaj aliaj kunestafoj. Pli vaste komprenita la humana talento esprimas tion, kion individuo altruisme (malegoisme) kaj aktive faras por helpi kaj apogi siajn "kunindividuojn", precize en malfacilaj vivositacioj. Rilate al Kosmologio de Martinus la evoluo de la humana kapablo [talento] baziĝas sur la konstelacio inter la du superkonsciecaj polusoj; la femala poluso kaj la maskla poluso kaj de la du alligitaj poluso-organoj; la emocia kaj la intelekta poluso-organoj. Kiel plurfoje preparolite tiu konstelacio ne estas permanenta aŭ neŝanĝebla, sed trairas ŝanĝon, kiu rilate al la homo etendiĝas de unu-polusa ĝis duobla-polusa stato. La polusa ŝanĝo ĉe la homo iĝas en la praktiko kreskanta egaleco aŭ harmonio inter sento kaj intelekto. Tio "ligas" kiel dirite la gravitenergion, kiu i.a. respondeas por ĉiu mensa senekvilibro. La polusa ŝanĝo en direkto al duobla polusa stato estas ĉiodecida por atingi la plenan intuician kapablon kaj tiel la kosman konscion. <sup>(Noto 3)</sup>

La homoj kiuj ankoraŭ ne atingis la pli suprajn ŝtupojn en mense-morala evoluo, kaj al kiuj mankas sperteco kaj scio por kompreni intelekto-analizon esploron de la kosmaj konkludoj aŭ veroj de la vivo, ili devas nepre aŭskulti pri la misteroj de la vivo rakontitaj kiel sagaoj, alegorioj aŭ fabeloj. Ĉiam ekzistis homoj, kiuj kapablis rerakonti la plej profundajn kaj plej subtilajn verojn de la realeco forme de fabeloj, sagaoj aŭ alegorioj. Kelkaj el la plej grandaj "poetoj" de la mondhistorio estis mondosavantoj kiel Budo, Jesuo kaj Mahometo. Ankaŭ multaj pli malpli grandaj animoj aldonis al tio, ĉiu laŭ sia ebleco. Unu el ili estis ekz la verkisto H.C.Andersen.

Martinus opiniis, ke lia Kosmologio konfirmis la Bibliajn mitojn kaj alegoriojn, speciale la mitojn pri la Kreado kaj la alegoriojn de Jesuo kaj la Apokalipson de Johano. Ĝi ankaŭ konfirmis la verecon de la klasikaj sagaoj kiel simbolaj rakontoj pri la reala vivo-aventuro. Tio ankaŭ inkludas la fabelojn de H.C.Andersen, kiujn oni povas karakterizi kiel kosmaj fabeloj. Tio signifas, tiuj de liaj fabeloj, kiuj pli malpli entenas

kosmajn principojn kaj leĝojn ekz la eternan vivon, precipe forme de eterne ripetanta ciklo kaj la nemorteblo de la animo, la polusa-principon, la polusa-ŝanĝon kaj la sorta- aŭ karmapricipon. <sup>(Noto 4)</sup>

## **Kvar planoj por signifoklarigoj**

Sekve de la supre skizitaj direktivoj oni devas konstati, ke mense kaj etik-morale evoluita homo havas grandan talenton kompreni la profundecon en la verkitaj fabeloj. Tiu "profundecon" mi nomas la kvaran signifoklarigon. Tio signifas la enhavon de kosmaj ideoj, pensoj kaj imagoj, kiujn oni ofte povas retrovi en la klasikaj fabeloj – precipe en la fabeloj de Andersen.

Krome oni povas konstati, ke en kelkaj verkoj oni povas kompreni kaj interpreti tiujn signifoklarigojn en kvar diversaj manieroj aŭ niveloj. Ili samtempe estas kreskantaj gradoj de profundiĝo kaj kompreno de la pridiskutata temo. Tiuj kvar diversajn interpreto-nivelojn mi nomas "signifoklarigojn" kaj skeme prezentitajn oni povas priskribi ilin tiel:

1. *La nivelo de ago*
2. *Ido-morala aŭ poenta nivelo*
3. *La aŭto-biografia nivelo*
4. *La universala aŭ kosma nivelo*

Signifoklarigo 1: Identiĝas kun la ago aŭ enhavo, kiu tute klare kaj litere kompreniĝas de la teksto.

Signifoklarigo 2: Temas pri la signifo, ideo, poento aŭ eduko, kiujn oni povas eltiri el la sama teksto.

Signifoklarigo 3: Ĝi tuŝas la pli malpli grandan enhavon de biografiaj aŭ aŭtobiografiaj elementojn, kiuj aŭ malferme aŭ "kaŝe" estas komprenitaj de la sama teksto.

Signifoklarigo 4: Ĝi estas kiel mi jam menciis la "kaŝitan" enhavon de kosmaj ideoj, pensoj kaj imagoj, ĉu konsciaj ĉu nekonsciaj. Kelkaj specialaj kondiĉoj estas postulataj por kompreni ilin.

Sed el la kvar signifoklarigoj kompreneble estas la kvara kun la kosma dimensio en la verkado de Andersen, kiu interesas nin en

tiu ĉi kunteksto. Tiu ĉi signifoklarigo speciale kunligas nin al la universalaj (kosmaj) ideoj, pensoj kaj imagoj kun la kosmaj analizoj de Martinus.

La *kosmaj ĉefproblemoj*, pri kiuj Martinus kaj ankaŭ H.C.Andersen sendepende de unu la alia priokupiĝas en ilia verkado, oni povas resumi en *kvar ĉeftemoj*, skeme prezentitaj tiel:

1. *La kognaj problemoj pri kredo kaj scio.*
2. *La ekzisto de Dio kiel eterna, ĉioamanta, ĉiosaĝa kaj ĉiopova esto, kreanto kaj providenco rilate al la problemoj pri la "malbono" ĉeestanta en la vivo.*
3. *La ekzisto de la animo kiel nemortebla kaj eterna estaĵo aŭ la individua esto de la personeco post la morto de la fizika korpo; kaj intime rilata al tio:*
4. *La rilato inter morala valoro kaj reala sorto aŭ alivorte: La problemoj pri justeco.* <sup>(Noto 5)</sup>

Kiel ĉiu kosmologi-studento devas scii tiuj kvar kognaj kaj filozofiaj ĉefproblemoj estas gravaj partoj en la Kosmologio de Martinus. Martinus uzis sian nekredeblan konscion, genian intuicio-talenton kaj eksterordinaran logike analizan kaj sisteman inteligentecon. Pro tio liaj kosmaj analizoj estas verkitaj en diskurse, analize preciza lingvo, kiu de tempo al tempo turniĝas en poetaj elturniĝoj. Ankaŭ Andersen havis nerifuzebajn ekzistencajn demandojn, al kiuj oni devas serĉi kaj ricevi respondojn. Sed li preferis intuicia, emocia identiĝo kaj kompreno antaŭ sistema, diskursa analiza pensado. Pro tio estis por li plej nature esprimi sin poete. <sup>(Noto 6)</sup>

## La ĝenro kaj universo de la fabelo

Je la nocio "fabelo" oni komprenas rakonto, kiu karakteriziĝas pri tio, ke la personoj pli prezentiĝas kiel tipoj ol individuaj personecoj. Naturaj, realistaj kaj supernaturaj fanatikaj elementoj aŭ fenomenuloj estas traktitaj per la sama evidenteco. Krome karakteriza trajto de fabelo estas, ke la intrigo malofte okazas en definitiva loko aŭ tempo. Fabeloj okazas en fiktiva universo en tempo ekstere de la tempo, kie la fizika leĝo pri kaŭzo kaj

efiko estas nuligita, kaj kie supernaturaj fenomenuloj kaj estaĵoj ekz. anĝeloj, troloj, drakoj i.a. prezentas sin per simila memkompreneco, kiel realaj figuroj.

La ĝenro de fabelo konsistas el vico de fiksitaj formoj kaj fiksitaj mondo de imagoj, kiuj ekz. ĉe Jung estas perceptitaj kiel psikaj konstantoj, la tiel nomataj arketipoj kompareblaj kun sonĝoj. Pro tio ofte estas fiksitaj modeloj en la agado kaj personkarakterizado ekz. la tri fratoj kiel en multaj popolarakontoj aŭ la tri hundoj kiel en la fabelo "La Fajrilo" (dane: "Fyrtojet") de H.C.Andersen.

La "transdonitaj", anonimaj tiel nomataj "popolarakontoj" estis notitaj pro literatura kaj scienca intereso de homoj kiel Perrault kaj La Fratoj Grimm. La ĝenro inspiris la "artverkadon", kiu fabelforme trovis eblecon – en mallonga kaj videbla formo – esprimi homajn sintenojn kaj reagojn kaj specifajn homajn tipojn. La lastaj karakterizoj precize temas pri la fabeloj de H.C.Andersen. Ili ankaŭ karakteriziĝas pri tio, ke ili ne vidas kontraŭdiron inter naturo kaj supernaturo, inter realo kaj miraklo aŭ inter fizika leĝeco kaj la miraklo de la vivo. La fabeloj de Andersen pro tio rakontas la fizikan same kiel la spiritan realecon per same granda memkompreneblo, nome de la baza rigardo, ke la vivo mem estas la plej granda fabelo. La verkita fabelo estas supernatura nur en negativa signifo, se tio ne baze kongruas kun la leĝoj, kiuj validas en tiu ĉi pli granda dieca aventuro, en kiu ni mem vivas.

Fabeloj ne vere temas pri religia verkado, sed fabelaj elementoj estas parto de multaj religiaj tekstoj. Kiel popolarakontoj oni daŭre rakontas la fabelojn anonime kaj buŝe de generacio al generacio eble ekde la mateno de la tempoj, ofte forme de internaciaj vagadarakontoj kreitaj en la popolkredo. La popolarakontoj ofte havas karakteron de solviĝo, ĉar ili kutime entenas feliĉan finon, kiu memorigas pri kulta sorĉadmondo de ĥaoso aŭ malbono. <sup>(Noto 7)</sup>

## Inspiro kaj intuicio

La kosmaj signifoklarigoj en la verkado de Andersen ekzistas kiel ĝenerala ideo aŭ

plano en liaj romanoj, dramoj kaj poemoj kaj en la membiografio, "La fabelo de mia vivo", sed plejparte en multaj el liaj fabeloj kaj rakontoj. Oni tamen ne imagu, ke Andersen konscie donis al siaj verkoj tiun enhavon, ke ni legu ilin kiel esprimoj de specifaj kosmaj ideoj, pensoj kaj imagoj.

Sed kiam precize la fabeloj enhavas tian kosman imagkomplekson tio devenas de la fakto, ke la spirito (imago) de Andersen en la momento, kiam li kreas, plenas de harmonio inter sento kaj intelekto, kaj vekis lian talenton de inspiro kaj intuicio. Dank al Martinus ni nun scias, ke tiu talento donas aŭtomatan aliron al la niveloj en la konscio, kiuj enhavas kaj la individuajn orkopiojn kaj la kolektivajn universalajn orkopiojn, kiuj montras sin forme de ideoj konceptoj aŭ pretaj imagoj, kiel fabelo, poemo, dramo aŭ simile. La kosma aspekto de la poezio estas kreita de aro de universalaj ideoj, pensoj kaj imagoj pri la vivo, la mondo kaj la esto, kiuj troviĝas forme de elementoj, kiuj Martinus nomas "orkopiaj rememoroj" plejparte forme de tiel nomataj "kosmaj konkludoj". (Noto 8)

Jen povas esti interese memorigi pri la priskribo de Martinus pri kiel la inspiro kaj intuicio de verkisto kaj artisto povas esti vekita. Laŭ li, tio okazas en tiaj momentoj, kiam ilia konscio estas plena de ĝojo aŭ eĉ ekstazo kaj tiam tuŝas rememoroj de pura am-materio:

"Kiam la intuicio-kapablo dum-momente ekflamas ĉe verkisto aŭ artisto fulmerapide naskiĝas ideoj por nova poemo, teatraĵo, fabelo aŭ aliaj artmanifestacioj, en organizita kaj preta formo en la konscia mondo de pensoj". (Noto 9)

Andersen siaflanke esprimis sin per jenaj vortoj: "Ofte ŝajnas al mi, ke memoroj, lulkantoj de alia mondo vekiĝas en mia animo kaj mi devas ripeti ilin". Per tiu ĉi frazo Andersen alludas, ke troviĝas "alia mondo", kiun la individuo iam forlasis. Dum specialaj okazoj oni povas kontakti tion kaj ricevi inspiron. Tio plej altgrade ankaŭ okazas kun Martinus. Li rakontas pri tio, kiam li parolas pri la mondo de la plantoj:

Dum somera tago tra la plantomondo

respeguliĝas beata lumo, kiu senkonscie aŭ mortante ekzistas kiel memoro pri lumomondo, kiun li/ŝi iam forlasis. Tio rememoras pri io bela kaj agrabla. Jen meze en la plej malhela plano de la vivo ĝi naskiĝas kaj donas novan forton kaj stimulas la sopiron reveni al la mondo de la lumo. (Noto 10)

Ankaŭ H.C. Andersen opiniis, ke la poeta vivo kaj esprimoformo laŭ kosma vidpunkto havas diecan fonton. Kelkaj el la fabeloj de Andersen kreiĝis tiamaniere. Ili ekzistis kvazaŭ kiel pretaj verkoj en la momento de inspiro. Sed tio ne signifas, ke liaj fabeloj kaj historioj facile kreiĝis. Ofte la ideo naskiĝis pere de inspiro, sed li devis multe prilabori la enhavon kaj lingvon, ĝis li opiniis ke la verko havis kontentigan kvaliton. Letere li rakontis tion al la dana kolego, la poeto B.S. Ingemann:

Mi pensas, kaj multe kontentigas min se mi pravus, ke mi komprenis la puran manieron verki fabelojn. La unuajn kiujn mi verkis, estis tiuj, kiujn mi mem aŭdis kiel infano, kaj kiujn mi rerakontis laŭ mia maniero. Tiuj kiujn mi mem kreis "La marvirineto", "La cikonioj", "La potentilo ansera" ricevis pli da laŭdoj, kaj tio donis al mi aeron sub miaj flugiloj! Nun mi rakontas el mia propra brusto, prenas unu ideon por la pli aĝaj – kaj rakontas por la etuloj pripensante, ke patro kaj patrino aŭskultas, kaj ke oni devas doni al ili ion por pripensi! Mi havas amason da materialo, pli ol por iu alia verkaĵo. Ofte estas por mi tiel, kiel ĉiu ĝardenbarilo, ĉiu floreto dirus: "Iom rigardu min kaj mia rakonto naskiĝos en vi!" Se mi faras tiel, mi havas la rakonton! – (Noto 11)

Jes certe Andersen "atingis la puran manieron verki fabelojn!" Li pensis pri sia publiko, same pri la plenkreskuloj kiel pri la infanoj, kiam li prilaboris siajn samtempe simplajn kaj geniajn ideojn kaj intuiciojn. Tiuj lastaj ofte venis al li tute neatendite, kiam li promenis sur la strato, vojaĝis, vizitis geamikojn kaj gekonatojn aŭ la karan Reĝan Teatron, de kie li rapidis hejmen por noti la ideojn surpapere. Sed antaŭ ĉio li havis siajn fontojn de inspiro en la naturo, kie li estis ĉirkaŭata de arbustoj, arboj kaj floroj.



H.C.Andersen tutsimple amis florojn, pleje rozojn. Krome li talentis pri floraranĝoj. Kaj imagu, ĉiuj liaj fabeloj estas skribitaj per in-koskribilo, ofte en tre simplaj cirkonstancoj, kiel ekzemple en lia eta apartamento Nyhavn nr 20 en Kopenhago. <sup>(Noto 12)</sup>

El la dana lingvo tradukis: Kerstin Rohdin

## Notoj kaj fontoj

- 1 Harry Rasmussen: *H.C.Andersen, H.C.Ørsted & Martinus – kompara studo*. Eldonejo Kosmologisk Information, 1997. 1-a ĉap.
- 2 La Libro de la Vivo (ĉi poste ml: LV) I, pecoj 251-2, 267, 275, 251-2.
- 3 LV IV, pecoj 1128, 1136-45, 1384, 1419-20, 1503.
- 4 LV I, peco 40; LV IV, pecoj 1184-5, 1193; LB V, pecoj 1600-1609; Logiko, ĉap. 51-3, 68.
- 5 La temo estas detale traktita en noto 1, en la menciita verko kiel tuteco.
- 6 Koncerne intuicio: LV I, pecoj 194-208, 213-5, 217. Koncerne kosma analizo: LV II, pecoj 35, 41, 500
- 7 Koncerne la fabelogenro, vidu. ekz. Vibeke Stybe: *De Cindrolino al Asterikso*. Eldonejo Munksgaard. 3-a eldono, 3-a. represo, 1980.
- 8 Koncerne "orkopioj" kaj "kosmaj konkludoj": LV I, pecoj 216-8; LV II, pecoj 356, 359, 388, 391, 397-403, 408, 422, 439-40.
- 9 LV I, pecoj 199-201. laŭ pecoj 197 kaj 209-10.
- 10 LV I, peco 183.
- 11 Kirsten Dreyer: *Leterkorespondanco de H.C.Andersen kun Lucia & B.S.Ingemann*. Eldondejo de Museum Tusulanum, 1997, volumo I, p. 190-193. La letero de B.S. Ingemann estas datita la 20-an de novembro 1843.
- 12 Ankaŭ la verkoj de Martinus estas kreitaj dum relative modestaj vivokondiĉoj, unue en ĉambro en Jagtvej 52A, 1.tv (Kopenhago), sekvante en Pile Allé, poste en Lykkeholms Allé kaj Joakim Larsensvej, en Glahns Allé, kaj finfine en lia modesta oficejo en la Instituto, Mariendalsvej 96 (Frederiksberg).



Pli da artikoloj kaj informoj pri la temo troviĝas en hejmpaĝo de Harry Rasmussen:

<http://hjem.get2net.dk/LivetsEventyr/>

kaj en la plurlingva hejmpaĝo de Martinus-Instituto:

<http://www.martinus.dk/>

## Notoj kaj novaĵoj

### Partoprenantoj el 7 diversaj landoj en la E-semajno en Klint 2008

Dum la esperanta semajno en aŭgusto 2008 en Martinus Centro, Klint, estis 20 partoprenantoj el sep diversaj landoj: Litovio, Rusio, Slovakio, Rumanio, Norvegio, Svedio kaj Danio. Inter la partoprenantoj estis nova estrarano de ILEI, rumana Mihai Trifoi, kiu rakontis, ke li nun fin-tradukis la libron "Logiko" de Martinus. Mihai, kiu tradukas el esperanto en la rumanan lingvon, jam tradukis ĉiujn simbollibrojn, nome la kvar volumojn de "La Eterna Mondbildo". / Ole Th.

### E-semajno en Martinus-Centro en 2009

Inter 1-a kaj 8-a de aŭgusto 2009 la esperanto-semajno en Klint okazos samtempe kaj paralele kun dana, sveda, angla kaj germana kursoj en internacia etoso. Mate-ne estos interpretata prelego kaj studrondo, posttagmeze estos konversacia rondo. Je la 18-a horo estos kvin prelegoj en esperanto de Ole Therkelsen.

Bonvenon en 2009! / Ole Th.

### Du novaj membroj de la konsilio de Martinus-Instituto

Estro de la konsilio de la Instituto daŭre estas la nederlandano s-ro Willem-Jan Kuijper, kiu nun estas la sola ne-esperantista konsiliano. Du aliaj konsilianoj s-ro Tune Laug kaj s-ino Solveig Langkilde ambaŭ kreskis en esperantaj familioj. En januaro 2008 germandevena s-ino Liesel Lind, kiu loĝas en sveda urbo Järna, fariĝis la kvara membro de la konsilio. Ŝi antaŭ kelkaj jaroj dum kvar monatoj plentempe studis esperanton en Karlskoga Popolaltlernejo, Svedio. En aŭgusto 2008 kopenhaga s-ro Per Jan Neergaard, kiu partoprenis bazan esperantokurson, fariĝis la kvina konsiliano. / Ole Th.

### EsperoTV – nova TV-kanalo pri Martinus

La rusdevena dana esperantisto Aleksandre Kogan en la reto ĉe worldTV.com starigis novan TV-kanalon "EsperoTV" kun prelegoj pri la kosmologio ĉe la adreso: [www.worldTV.com/esperoTV](http://www.worldTV.com/esperoTV).

Ejnar Hjorth kaj Aleksandre Kogan filmis kelkajn prelegojn en Kopenhago kaj en Martinus Centro, Klint.

/ Ole Th.

### Esperanto 2.0 TV – alia nova esperanta TV-kanalo en la reto

"Esperanto 2.0 TV" estas nova esperanta TV-kanalo, kiu estas trovebla ĉe la adreso: [www.worldTV.com/esperanto\\_2.0\\_tv](http://www.worldTV.com/esperanto_2.0_tv). Spekteblas interalie filmo farita en la UK en Roterdamo en julio 2008 pri edukado, vidu ankaŭ [www.edukado.net](http://www.edukado.net). Interalie oni mencias la lingvan kurson "Bekkurso" legebla ĉe la adreso: [www.edukado/bekkurso.info](http://www.edukado/bekkurso.info).

/ Ole Th.

# La Kosmologio de Martinus

Martinus estis dana verkisto (1890-1981).

La kosmologio de Martinus estas spirita scienco. Ĝi priskribas la eternajn principojn, leĝojn kaj bazajn energiojn, kiuj fundamentas la spiritan kaj fizikan mondojn. Laŭ kosma konscio ĉio estas viva, eĉ de la atomo en mikrokosmo, de plantoj, bestoj kaj homoj en mezkosmo al galaksisistemoj en makrokosmo. La universo estas unueca organismo, viva estulo.

La mondo ĉiam evoluas. Por kompreni la evoluon de besto al homo oni bezonas la pensojn pri reenkarigo, sorto kaj karmo. La homaro nun spertas suferojn kaj mallumon. Iom post iom tio kaŭzas en ĉiu homo evoluon al logika pensmaniero, al pli humana sinteno kaj homama kapablo. Tio estas la provizora celo de la evoluo.

La plej gravan instruadon donas al ni la vivo mem. Ni ĉiuj estas naturaj membroj de tiu lernejo. Tial la kosmologio de Martinus ne havas iajn ajn membrecon, unuiĝon aŭ asocion. Sed ĝi celas doni al la unuopa homo komprenon pri la eternaj vivleĝoj, kaj helpi al ĉiu intereso fariĝi memstara kaj kapabla mem vivi homame, logike kaj tolereme.

Pro komenciĝanta amkapablo la homaro iam forlasos la bestoregnon kaj la mortigan principon kaj kreas internacian, pacan mondregnon.

Studado de la kosmologio donas al vi helan kaj optimisman vivkomprenon.

## MARTINUS-INSTITUTO

en Kopenhago, Danio, eldonas la librojn de Martinus kaj informas pri lia kosmologio.

## MARTINUS-CENTRO

en Klint, Danio, estas studejo por la kosmologio. Okazas ankaŭ instruado en Esperanto.

# KOSMOS

## ELDONANTO

Martinus-Instituto  
Mariendalsvej 96  
DK-2000 Kopenhago  
Tel. (+45) 38 34 62 80  
Fakso (+45) 38 34 61 80

### Telefontempo:

Lundo-ĵaŭdo 13-16  
Vendredo: 9-12

DK p. ĝiro ...642-9580  
UEA-kodo ... mins-d

www.martinus.dk  
info@martinus.dk

## REDAKCIO

Helen Claesson  
Ole Therkelsen  
(respondeca)  
Jonas Dahlmose  
Kompostado:  
Ove Koldsø

## ABONO

Jaro: 2 ekzempleroj  
Prezo en EU  
DKK 70,00 aŭ EUR 9,40

Prezo ekster EU  
DKK 56,00, EUR 7,50  
aŭ USD 9,60

Unuopaj kajeroj:  
DKK 35,00

Se vi ne povas pagi per  
fremda valuto, demandu  
la Instituton

## KOPIRAJTO

©Martinus Idealfonduso

Reuzo de teksto kaj  
bildoj nur laŭ skriba  
permeso.

ISSN 1600 4116.